EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

## Enhavo


- AMO pluiras virtuale!
- AMO 65 – ene de la Monda Fest!
- La Eventa Servo de UEA
- VEKI – hodiaŭa ĝisdatigo!


Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-30 sendita el Budapeŝto, la 5an de junio*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. 2000 kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO 65 kadre de la Monda Festivalo de UEA

La informoj en EKO 29 pri AMO 65 restas validaj. Novaĵo estas, ke tiu seminario aperos ene de la programo de la Monda Festivalo de UEA (mallonge: MondaFest). Kiel konate, la intensa reta festado de la Universala Kongreso okazos tra la UK-semajno komence de aŭgusto. Sed MondaFest daŭros de la 20a de junio (sabato) ĝis la 20a de septembro (dimanĉo).

Vidu informojn ĉe:

https://uea.org/aktuale/komunikoj/2020/Oficiala-anonco-de-Monda-Festivalo-kaj-Virtuala-Kongreso-de-Esperanto-2020

La nuna stato de la praktika programo de MondaFest troviĝas ĉe: https://eventaservo.org/e/mondafest2020

La programo por AMO 65 bone progresas – detaloj sekvos.

# La eventa servo de UEA

Esperantistoj deziras uzi la Internacian Lingvon por vojaĝoj, interkomunikado kaj amikiĝoj, kiuj nuntempe povas realiĝi ne nur reale, sed ankaŭ virtuale. Antaŭ kelkaj jardekoj por scii pri aranĝoj kaj elekti el ili, oni serĉis informojn en la paĝoj de la revuo *Esperanto*, aŭ ekde 1996 oni vizitis la retejon de *Eventoj* kaj trastudis ties kalendaron. Nia movado havas novan diskonigan servon, kiu donas **nuntempe plej multe da informoj pri la realaj kaj virtualaj aranĝoj en la tuta mondo. La retejo nomiĝas Eventa Servo (www.eventaservo.org).**

Fernando Maia Jr.

# Greziljono – malfruigita somera programo

Franca Esperanto-Kultudomo en kastelo Greziljono informas vin, ke ĉiuj kursoj planitaj en julio ŝoviĝis al aŭgusto:

2020-julio-27/31 - Verda Naturisma Semajno kun INOE kaj FFN
2020-aŭg-02/09 - la Verdaj Skoltoj tendumas, skoltumas, lignokonstruas
2020-aŭg-03/13 - 6-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve)
2020-aŭg-03/14 - 4-a Maratona Esperanto-kurso dum 7 ĝis 11 tagoj
2020-aŭg-10/14 - 32-a Internacia E-Konferenco post OSIEK « Naturo, Medio, Klimato, Scienco »
2020-aŭg-17/27 - 10-a Festa Semajno por infanoj, adoleskuloj kaj familioj

Aliĝoj: gresillon.org/aliĝo Informoj: kastelo@gresillon.org

**La ŝlosilaj Esperantaj organizoj meritas vian subtenon en la nunaj malfacilaj tempoj!**

**UEA: https://uea.org/alighoj/alighilo**

**ILEI: https://www.ilei.info/Alighilo-2019-03-01.pdf**

**UMEA: Membreco (por fakuloj) aŭ subteno (nefakuloj): senpaga: skribu al: umea<ĉe>uea.org**

**AMO: Por subteni nian programon, sendu donacan sumon al UEA kun klara indiko "Por AMO".**

## Programskizo de VEKI Ĝisdatigita ĝis la 5-a de junio 2020

**53-a Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI**

Vidu en <www.ilei.info>. La triparta horskemo por la programo jam aperis ĉe EKO.

Ĉiuj tagindikoj laŭ la Centreŭropa tempo (CEST)

1-a Tago (julio 25) INAŬGURO Unua sesio. Ĉefplado. MALFERMO
La enkonduka prelego estos farita de Prof. Dr Davide Astori **"Interlingvistiko kaj Universitato: pripensoj el fakula vidpunkto".** Dua sesio, Azia Mateno. **Faktoj kaj fantazioj, poemoj kaj esprimoj pri la temo *mateno*.** La prezento estos farita de Aŭrora Bute kaj Mireille Grosjean.





2-a Tago (julio 26) **Strukturoj kaj Komitato**
La komitatanoj estas informitaj pri la kunveno.

3-a Tago.(julio 27) **Lingvoj**. Iom post iom alvenas proponoj por prezentado de lingvoj. Same anoncu vin! Taga gvidanto: Elena Nadikova.

4-a Tago. (julio 28) **Tago de Esperanto en universitatoj (la konferenca temo)**
8 prelegoj jam planitaj **:** Astori, Danylyuk, Dols, Gobbo, Koutny, Manzano Arrondo, Petrovic, So. Estas entute 10 prelegmomentoj en tiu tago. Do profesoroj anoncu vin ! Respondeca estrarano Ivan Colling.

5-a Tago. (julio 29) **La Tago de la Ligo. Kun la Gastronomia Rondo.**
Pri la Ligo okazos raportoj pro la vivo de la Ligo kaj estos okazo diskuti pri ĝi. En preparo estas podiaj diskutoj pri IPR kaj *Juna Amiko* ; pri la bazaj servoj al la membroj kaj novaj vojoj por EIT Esperanto Instruista Trejnado. Por la Gastronomia Rondo jam alvenis kelkaj filmetoj. Same anoncu vin! Filmistoj pri gastronomio : ek al kuirado kaj filmado ! (Alvoko baldaŭ aperos en EKO).

6-a Tago.(julio 30) **La Tago de Pedagogio.**
Ok prelegproponoj alvenis. Anoncu vin! Respondeca persono: Elisabeth Le Dru.

7a Tago: (julio 31) **Konkluda tago:** AMO-seminario, numero 66. Prezento de la 54-a ILEI-Kongreso en 2021. Konkludo.

**Artistoj: Ses artistoj anoncis koncerton.** Anjo Amika, Bronŝtejn, Fernandez, JoMo, Kajto, Fransoazo. Estas entute 20 artaj momentoj, fine de ĉiu sesio. Artistoj: anoncu vin !


JOMO kun Kaŝi en Pollando

Foto: SMG.

Kontakto ekzistas inter ILEI kaj E@I, firmao slovaka kaj esperantista, kiu prizorgas platformon similan al skajpo kaj zomo. La estraro baldaŭ decidos.

vortoj: 620

====================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/18. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.